## EL LA FAKOJ

### Sciigoj de la Terminologia Centro de I.S.A.E. (ISAE—TC—133)

(La fakoj estas envicigitaj laŭ la UDK. Ni uzas la simbolojn por lingvoj denove laŭ la esperantaj nomoj, do: A angla, F franca, G germana, H hispana, I itala ktp.)

54 **»KEMIO INTERNACIA«**, revuo kiu estis mendebla ĉe Urugvaja Esp. — Societo (Casilla de Correo 1040, Montevideo) kaj kiu regule aperadis ekde 1965, en la jaro 1969 ne plu aperos, ĉar estis nur 140—150 abonantoj, kaj tiel ne estis eble kovri la elspezojn, kiel informis nin la redaktoro s-ro Alberto Barrocas. Domaĝe, ke tiu unua kaj ununura pure scienca Esperantorevuo nun malaperos; tiaj pure fakaj revuoj en Eo do estas eminente gravaj por fari alloga Esperanton ankaŭ por neesperantistaj fakuloj, kaj ĝuste tiu revuo pri kemio devis esti modelo por pluaj kreotaj fakrevuoj! UEA ne volis kontribui ĉe la eldonado kun la argumento, ke ĝi ankaŭ ne disponas pri la necesaj monrimedoj.

54 **Kemio.** — Ellaboris komparon de esperantaj kemiaj terminoj laŭ diversaj vortaroj kaj liston de ĝeneralaj fakaj esprimoj en kemio Inĝ. Zdénék Pluhar, kunlaboranto de nia kompetentulo pri kemio Otakar Matulík (adreso de O. Matulík: Fuĉikova XIII/3985, Gottwaldov, ĈSSR).

54 **Kemio.** — Volonte kunlaboros pri kompletigo de la kemia terminaro s-ro L. Brieger, kemiisto, Av. Mem de Sá, 319 Rio de Janeiro (Brazilo).

54 + 66 **Kemio. Kemia Tekniko.** — Inĝ. J. Manceau, 14, rue de la Mine, F-57 Creutzwald, Francujo, nun klopodas starigi plurlingvan terminaron kemi-inĝenieran. La fakuloj bonvolu kontakti kun li.

598.2 **Ornitologio.** — S-ro W. de Smet, Prezidanto de Ornitologia Rondo Esperantlingva — O.R.E. — Wilgendreef 14, Heide, Kalmthout, Belgio, sciigis, ke la laboro por la terminaro de eŭropaj birdoj, farita de la Nomenklatura Komisiono de ORE, bone progresas kaj ke boldaŭ aperos listo de ĉ. 600 nomoj. La nuna gvidanto de tiu komisiono estas: S-ro R. Bossong, Floraplein 23, Eindhoven, Nederlando. En la komisiono laboras deko da ORE-anoj.



621.38 **Elektroniko.** — S-ro K. J. Young, Broadmoor Hospital, Crowthorne, Berks., Anglujo, estas kompilanta terminaron pri Elektroniko A-Eo, kiun li intencas poste eldoni aŭ eldonigi. Ĝi baziĝas sur la Grupo 07 — Elektroniko — de la IEC-Vortaro kaj sur la esperantlingvaj tradukoj faritaj de K. Siwicki en sia „Pola-Esperanta Terminaro de Elektroniko.

621.793 **Elektrokemio kaj Galvanizado (Metaltegado).** — S-ro Jaok McCarthy, kemiisto, direktoro de „Interparl", P.O. Box 213, Monroeville, Pa., 15146, Usono, informas nin, ke lia traduko esperanten de la kompendio de Glasstone pri Galvanizado kaj metaltegado nun aperis, kaj ke li jam sendigis al TC plurajn ekzemplerojn.

638.1 **Abelbredado.** — Vortaron pri abelbredado ellaboras grupo gvidata de s-ro Witalis Kuczera, Mierzezice 248, prov. Zawiercie, woj. Katowice, Pollando.

66 **Kemia Tekniko.** — Volonte kunlaboros pri kompletigo de la terminaro pri kemia tekniko, sap-industrio kaj insekt- mortigiloj s-ro L. Brieger, kemiisto, Av. Mem de Sá, 319, Rio de Janeiro, Brazilo.

**R. Haferkorn**